Christian Morgenstern,

# [Ne diru]

*tradukita de Willy Nüesch*

Ne diru: ĝi ne imageblas,
ne elpenseblas! Iam foje
aperas ia homo voje
kaj al la fontoj sobpenetras;

portas el fonto de l' natur'
manplenojn du al luma vivo.
Kaj restos sperto-efektivo,
kion pratempo sonĝis nur.

Kaj kiam ĉiuj venas trinki,
vizaĝo ŝanĝas sin kaj mens':
kvazaŭ vualoj ŝajnas sinki,
mallumo iĝas luma senc'.

*Traduko de la Germana poemo "[Sag nicht]" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-139-278 (2013-08-28 18:43:11)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net". Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*